FN PER ANC 47

N° 240 DECEMBRO 2009

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

# ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas :Pierre Lemarchand, 2 les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine. Tel. 02 35 34 28 78
LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.



**L'association *Hérouville-Espéranto,* en collaboration avec l'association *Amitié Solidarité Tikhvine* organise une soirée russe, le *vendredi 8 janvier 2010,* au Café des Images, à *Hérouville--Saint-Clair* (14200) Calvados.**

**Programme de la soirée :**

19h 00 Repas russe à la Cafétéria
(réservation et paiement sur place ou 02 31 94 21 48)
20h 45 Les Petites Vieilles
film de Gennady Sidorov (2004)
22h 45 Concert avec les chanteurs espérantistes de Tikhvine
**Mikaelo Bronstejn, Vera Vlasova, Inga Kreyson**
Ils chanteront en espéranto et en russe.

Les places pour le film seront vendues au tarif habituel du Café des Images (3.80, 4.80 ou 5.80 €) . Le concert sera gratuit.

## *En tiu numero :*


| | |
|---|---|
| Rusaj geamikoj en Hérouville Saint Clair. Universitato Mulhouse. Vikipedio. | 2 |
| Marguerite. | 3 |
| Vivo en Yvetôt. | 3 |
| Kotizoj - Abonoj 2010. | 4 |
| Mediteranea E°-Semajno | 4 |
| Nia bulteno tra jaroj .3. | 5 |
| Kotizintoj. Asocia kaso. | 6 |




Vera VLASOVA - Inga KREYSON el Tikhvine.

## Oficiala Esperanto-Kurso en la Universitato de MULHOUSE.

Ekde septembro 2009 ekzistas E°-Kurso en la **Universitato de Alta Alzaco, en MULHOUSE**, kadre de la Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Homaj Sciencoj. Ĝin sekvas deko da studentinoj de la unua kaj dua jaro de lingvaj studoj kaj historio. La kurson gvidas Edmond LUDWIG, prezidanto de E°-France Est. La dekano, Sinjoro Yann KERDILES, kiu jam prelegis en Mulhouse pri la lingvoproblemo, petis plurajn sinsekvajn jarojn la E°-grupon starigi budon en la fakultato okaze de la Tago de Malfermaj Pordoj. Post malkovro de E° per memlernado, li decidis proponi la kreon de tiu kurso.

**Si vous désirez recevoir gratuitement les prochains bulletins en couleur, par Internet, selon le format «PDF» envoyez-nous votre adresse par courriel à :**
**LEMARCHANDPI@wanadoo.fr**

## Agrablajn festotagojn por ĉiuj !



• « Le **15 octobre**, la version en espéranto de Wikipédia, **Vikipedio**, a atteint **120.000** articles. Vikipedio occupe maintenant la **21ème position** en terme de nombre d'articles parmi les différentes langues de **Wikipédia**.

**Chaque jour, environ 160.000 personnes visitent Vikipedio**. (donc sans compter les robots)

A ce titre la version en espéranto de Wikipédia occupait en août la **33ème place** - un peu après la grecque et la slovène, un peu devant les versions lituanienne et serbe.

**Importance de Vikipedio :**

La version espéranto de Wikipédia a une utilité multiple pour les espérantistes. Premièrement, elle sert de référence - en fait c'est jusqu'à présent la première encyclopédie généraliste existante depuis 122 années d'histoire de l'Espéranto. Deuxièmement, elle soutient en cela aussi le travail et la discussion sur la terminologie. Troisièmement, **Vikipedio** montre clairement au monde non-espérantiste que l'Espéranto est continuellement utilisé et évolue chaque jour. La langue Espéranto, il y a 122 ans la plus petite langue du monde, a depuis une place solide parmi les 50 langues les plus importantes. On constate cela aussi, **Vikipedio** mis à part, au travers de plusieurs autres statistiques et par son utilisation dans les sites multilingues. »

*El « **La Sago** » N°59 novembro 2009. Revuo de **Sat-Amikaro** 132-134 Bd Vincent Auriol 75013 Paris.*

• « Devant l'ordinateur, le seul fait de taper le mot **Espéranto** fait apparaître **47.000.000** résultats en 19 secondes pour un moteur de recherche et **861.592** résultats en 16 secondes pour un autre. »

*El « **Le Monde de l'Espéranto** » N°570-1 septembro 2009. Revuo de **Esperanto-France** 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris.*

# MARGUERITE

En ĉiuj francaj urboj, ne maloftas stratoj, kies nomo venas de homo mortigita dum la dua mondmilito. Ili memorigas al la pasanto, ke dum 6 jaroj okazis ege doloriga internacia konflikto kun milionoj da viktimoj. Tion ni scias per historiaj libroj aŭ televidaj elsendoj, kiuj klarigas, kiel Hitlero sukcesis faligi Germanion en frenezecon, kiel li metis sub sian jugon la tutan kontinenton ĝis Stalingrado kaj ĝis la 6a de junio sur la normandaj strandoj. Ni scias, ke parto de nia popolo kunlaboris, ke alia parto rezistis, ke la cetero -la plej multo- elturniĝis por vivteni, por trovi terpomojn kaj buteron.

Dum tiu eksterordinara buĉado, multaj homoj vivriske rezistis por elradiki naziismon, por savi la honoron - sian kaj tiun de sia lando. Kion ni scias pri ili ? Plej ofte nur nomon sur ŝildeto ĉe stratangulo. Plej ofte tiuj batalintoj de l'ombro restas en ombro por la generacioj kiuj ne travivis tiun tragikan periodon.

Christian Langeois, emerito, longtempe sindikatisto, edzo de E- klubanino en Hérouville, ĵus aperigis biografion de Marguerite Buffard, komunista rezistinto, kiu mortis en Lyon la 13an de junio 1944, sin faliginte trafenestren por ne perfidi siajn kamaradojn. Christian Langeois preskaŭ hazarde trovis ŝian nomon kiel instruistinon pri filozofio en Caen, sed tiom interesiĝis pri tiu tre atentokapta virino (kies memorspuroj preskaŭ malaperis), ke li decidis verki libron.

Dank'al amaso da leteroj kiujn ŝi konstante interŝanĝis kun sia familio, kaj diversaj dokumentoj kaj atestaĵoj, Christian Langeois tre lerte klarigas kiel Marguerite, rimarkinda instruisto, fariĝis tre fidela komunisto. Ŝi multe klopodis por organizi kaj kreskigi komunismon en Calvados laŭ stalinaj postuloj kiujn ŝi strikte obeis kaj aplikis. Ŝi sindone subtenis strikojn sed senindulge kontraŭbatalis laŭdiran trotskismon. Kiam siavice ŝi estis flankenmetita de la komunista partio, Marguerite kruele suferis kvazaŭ forpelita de sia propra familio.

Sed ŝi baldaŭ senrezerve, je la nomo de sia idealo, ekrezistis kontraŭ naziismo. Oni prizonigis ŝin en Dijon en majo 1940 kaj ekde 1942 en politik-koncontrejo por virinoj en Aube kaj poste en Mérignac de kie ŝi sukcesis eskapi en decembro 1943.

Dum la lastaj monatoj de sia juna vivo ŝi fariĝis grava ano de FTP en Lyon.

Pro siaj talentoj, Marguerite entuziasmigis siajn lernantojn, strikantajn laboristojn, la virinojn kun ŝi en la malliberejoj. Ŝi ĝisoste kredis komunismon kaj la komunistan partion. La oktobra revolucio definitive lumigis vivon de tiu virino kiun ni nun (post 70 jaroj da « reala » komunismo) taksus samtempe klera, romantika, naiva.

Tra la bela libro de Christian Langeois oni rapide ekamas tiun junan virinon kiu senkalkule oferis sian vivon kaj travivis emociigan amon kun Jean Flavien, sia edzo. Dank'al ŝia vivo, oni pli bone komprenas kiom komplika estis la situacio antaŭ kaj dum la mondmilito, kiom malfacile estis travivi tian ŝtormon.

Kion ni estus farintaj ?

*Yves NICOLAS*




*Marguerite. Biographie de Marguerite Buffard-Flavien (1912-1944) Christian Langeois. Le Cherche Midi octobre 2009 18 €*

## En YVETOT :

« Dum la jaro, ni partoprenis ekspozicion dum la tago de la asocioj, kaj ni havis kurson kun 2 lernantoj. Tiu kurso interrompiĝis dum la somero, sed funkciiĝas denove ĉiun ĵaudon, de la 14a horo kaj 30 ĝis la 16a, ek de la 15a de oktobro. Dum la ferioj, la lernantoj sekvis staĝon en Grésillon. »

*Pierre POTTIER*

## MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

**27a februaro ĝis 6a marto 2010**

***AGAY - St RAPHAËL- Lazura marbordo***

**Francio**

Se ankoraŭ frostas en via regiono, venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro !!!

Vi povas plibonigi vian nivelon de Esperanto partoprenante en kursoj. Gvidantoj de kursoj estos :

1a kurso : Rafael MATEOS (el Hispanio).

2a kurso : Malcom JONES (el Britio).

3a kurso : Waldemar LIPOWICZ (el Pollando), Diskut-Analizo : « Novelo ».

**Kurs-horaroj :** matene : 9.15 ĝis 12.00 h - posttagmeze : 18.30 ĝis 19.30 h.

**Libera posttagmezo** por viziti : Frejus (klostro), St Raphaël (muzeo), Nice (karnavalo), Menton (festo de la citronoj), Esterel-monteto (mimozo kaj piedirado), bazaro en Vintimille (Italio), ktp...


Familia vivo ĝis la vespero.
**Distraj vesperoj :** esperantaj prelegoj, kantoj, skeĉoj... La studejo estas komforta hotelo « Le Renouveau »

**Atentu : aliĝu antaŭ la jarfino !**
Poste, se restos lokoj !

**Informoj kaj aliĝoj :**

Monique PREZIOSO, 92 impasse Jean Moulin 83700 Saint-Raphaël : **Tel.** : 04.94.83.06.88.

**rete** : prezmoni@hotmail.com



## Kotizoj - Abonoj por 2010 :

**Esperanto France** 4 bis rue de la Cerisaie 75014 Paris
Tel. : 09.51.77.18.33. www.esperanto-france.org

| | |
|---|---|
| Cotisation : (chomeurs : 15 € ) | 33,00 € |
| Abonnement au « Monde de l'Esperanto » : | 30,00 € |
| Abonnement tarif réduit (Adhérents) : | 22,00 € |

- *Universala Esperanto Asocio :*

| | |
|---|---|
| Cotisation : (avec Jarlibro) | 24,00 € |
| Cotisation, tarif réduit : (sans Jarlibro) | 10,00 € |
| Cotisation avec abonnement à la revue « Esperanto » : | 60,00 € |

- *Esperanto-Jeunes :*

| | |
|---|---|
| Cotisation avec abonnement à la revue « Jeunesperanto-Info » : | 30,00 € |
| d° - pour étudiants, chômeurs : | 15,00 € |

- *TEJO : (Association mondiale des Jeunes) :*

| | |
|---|---|
| Cotisation + abonnement à « Kontakto » et à « Tejo-Tutmonde » : | 24,00 € |
| - d° - + abonnement à la revue « Esperanto » | 59,00 € |

- *Abonnements à quelques revues :*

| | |
|---|---|
| - « Esperanto », revue de l'UEA : (11 n°s) : | 38,00 € |
| - « Heroldo de Esperanto » : (17 n°s) : | 39,00 € |
| - « Juna Amiko » : (3 n°s) : | 14,00 € |
| - « Femina » : (4 n°s) : | 24,00 € |
| - « La Kancerkliniko » (5 n°s) : | 25 00 € |
| - « La Ondo de Esperanto » (11 n°s) : | 38,00 € |
| - « Literatura Foiro » : (6 n°s) : | 36,00 € |
| - « Kontakto » (TEJO) : (6 n°s) : | 23,00 € |
| - « Monato » : (12 n°s) : | 49,00 € |
| - « Monato » : par internet : | 29,40 € |
| - « Verda Lupeo/Fenikso » : (3 n°s) : | 17,00 € |

**Esperanto-INFO :** Les Bories de Coperlac.
Mas de Saint Chély. 48210 Sainte Enimie.
CCP. : n°11.901.46.B Marseille.
Abonnement + Adhésion: (6 n°s) : 20,00 €

**SAT-AMIKARO :** 132/134 Boulevard Vincent Auriol 75013 Paris. Tel. : 01.22.24.50.48.
www.esperanto-sat.info
CCP. : 37.852.90.L La Source.
Cotisation + abonnement à « La Sago » : 35,00 €
Abonnement simple «La Sago» sans adhésion 32,00 €

**SAT :** Sennacieca Asocio Tutmonda : 67 avenue Gambetta. 75020 Paris. Tel. : 01.47.97.87.05.
www.satesperanto.org
Cotisation à SAT + abonnement à « Sennaciulo » (11 n°s) : 57,00 €
Pierre QUILLAUD, 16 rue du Lt de Vaisseau Paris. 76120 Le Grand Quevilly.
CCP. : SAT-PERANTO : 17.333.10.N. Paris.

FOLIUMANTE nian REGIONAN BULTENON tra JAROJ -3-

| | | |
|---|---|---|
| **Bulteno** n° **8a** Marto Aprilo 1947 | 9 paĝa | Propaganda respondeculo : Sro Dupuis. - Raporto de Sro Jouis pri la Federacio « ne ĉiu volas aŭtomate aliĝi pere de nia federacio al UEF aŭ IEL » → du asocioj Normanda Federacio + Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj. Sliparo : 243adresoj. Nur 100 resendis la demandaron. Manche : 1. Orne : 3. Calvados : 8. Eure : 16. Seine Inférieure : 72. - UFE : 38. SAT/Sat Amikaro : 18. UEA : 3. La unua bulteno estis franclingva, la postaj esperantlingve. |
| n° **9a** Majo Junio Julio Aŭgusto 1947 | 11 paĝa | **Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj**. U.N.E. naskiĝis :Kongreso en Evreux 11an de majo : 42 partoprenantoj. Respondoj al la referendumilo : 52 kotizantoj, nur unu malfavora. Prezidanto : Sro Jouis, Vicprezidanto : Sro Bosc, Sekretario : Buisson, Kasistino : Fino Loison, Bultenisto : Sro Dieudegard, Propagandisto : Sro Boissière, Gazet-servo : Sro Chatelain, Membroj de la estraro : ge-sroj : Dumont, Mary, Delor, Cavillon, Montagné, Hullin. |
| Speciala informilo | 3 paĝa | Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj. Sendita de Sro Dieudegard. Sroj Bosc + Saget malfavoras UNE. Sroj Dieudegard + Buisson favoras. Sro Noël estis elektita sed petis ke oni anstataŭigu lin per Sro Mary, Sro Delamare (Fécamp) |
| **Bulteno** n° **1a** Septembro Okt. 1947 | 9 paĝa | Ekzistas E°-grupoj en Le Havre (2), Rouen, Elbeuf, Ma romme, Sotteville, Fécamp Yvetot, Evreux. Ĝis la apero de la bulteno : 97 kotizantoj. |
| n° **2a** Nov. Dec. 1947 | 6 paĝa | Por 1947, 99 kotizoj : 74 el Seine Inférieure, Eure : 16, Calvados : 9. Sro Boissière forlasas la propagandistan respondecon. |
| n° **4a** Okt. Dec. 1948 | 3 paĝa | Redaktas Fino Montagné. Eksiĝo de Sro Jouis. - Nova komitato : Prezidanto Sro Bosc, Vicprezidanto : Sro Boissière (Elbeuf), Sekretariino : Fino Montagné, Kasistino : Fino Loison. |
| n° **5a** Janv. Febr. 1949 | 3 paĝa | Artikolo kial Sroj Jouis, Buisson kaj Dieudegard eksiĝis. |
| n° **6a** Junio 1949 | 3 paĝa | 18a Normanda Kongreso, Honfleur : 22 majo 1949. - Prezidanto : Sro Bosc, Vicprezidanto : Sro Boissière, Sekretariino-Bultenistino : Fino Montagné, Kasistino : Fino Loison. - Unu paĝo en la franca lingvo. |
| n° **7a** Oktobro 1949 | 3 paĝa | Artikolo de Sro Guillaŭme, landa ĉefdelegito de UEA laŭ kio « Sro Bosc estas preta proponi al SAT kunfandiĝo kun UFE. - Artikolo en la franca de Sro Bosc. |
| n° **10a** bis Junio 1950 | 4 paĝa | 19a Normanda Kongreso en Le Havre : 13/14 majo 1950. - Prez. : Sro Bosc. Sekretariino : Fino Montagné. Vicprez. : Sro Hullin. Kasistino : Sro Buisson. Kasisto de la federacio de UFE : Sro Delaunay (Rouen). Sekretario - d°- : Sro Bosc. |
| n° **14a** bis Junio 1951 | 3 paĝa | 20a regiona kongreso en Rouen 27 majo 1951. 47 personoj partoprenis la voĉdonon. Prezidanto Sro Bosc. Vicprez. : Delamare (Fécamp). Sekretariino : Bellettre (Evreux). Kasistino : Sino Buisson. Bultenistino : Fino Montagné. |
| n° **17a** Februaro 1952 | 3 paĝa | 21a regiona kongreso en Evreux : 18an de Majo 1952. Prezidanto : Sro Bosc. Vicprezidanto : Sro Huet. |
| n° **21a** Marto 1953 | 3 paĝa | Artikolo de Sino Bellettre pri sliparo de ĉiuj Esperantistoj en Normandio. |
| n° **23a** Septembro 1953 | 2 paĝa | 22a regiona kongreso en Caen. 10an de Majo. |
| n° **25a** Marto 1954 | 3 paĝa | Sro Bosc « Officier d'Académie » pro Esperanto. |
| n° **27a** Junio 1954 | 3 paĝa | 23a regiona kongreso en Le Havre. 15/16 Majo 1954. Prezidanto : Sro Bosc. Sekretariino : Bellettre. Kasistino : Letendre. Bultenistino : Fino Montagné |
| n° **28a** Oktobro 1954 | 3 paĝa | André Marie akceptas la Honoran Prezidantecon de U.N.E. 13an de junio en La Bouille, renkontiĝo de la Evreŭx kaj Fécamp grupoj. (12+18 anoj). |
| n° **31a** Aprilo 1955 | 2 paĝa | 24a kongreso en Fécamp : 23/24 Aprilo 1955. |

Daŭrigota...

# ESPERANTO - NORMANDIE

***Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures***

## Listo de kotizintoj por 2009

Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba listo : Ge-Sinjoroj :

BATAILLE, BESSIERE, BONNET, *CARON, CHALM, COLOMBEL,* DEFRANCE, DUBOIS, DUBUC, DUFEU, DUFRESNE, DUFOSSE, *ERHARD,* FRESLON, *GIBERT, GUEROULT, GUERRE, GUILMOT, GROULT,* HELBERT, HUBERT, *JOUVIN,* LANGEOIS, LEBRETON, LEBRUN, LECOUVREUR, LELOUEY, LEMARCHAND, LEMELTIER, LEPREVOST, LEROY, LESUEUR, LEVESQUE, LEVY, LOISEL, LONGUET, *MAGEREL, MARIE, MICHAUD, MILLET,* NARDIN, *PAUMIER,* QUILLAUD, *RAUCH, ROBIOLLE, ROUSSEAU H., ROUSSEAU J.,* SCHERTZER, SENECAL, SERY, *TAILPIED, TANGUY.*

Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN**
**Abon-kotizo por 2009 : 8 Eŭroj**, kaj sendu ĝin al la kasisto.



## Unua listo de kotizintoj por 2010

Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba **unua** listo : Ge-Sinjoroj :

CARON, *CHALM,* COLOMBEL, *DUFEU,* DUFRESNE, *GASCOIN,* JOUVIN, *LEBRUN,* LEMARCHAND, *NICOLAS,* ROUSSEAU H., SERY.

Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN**
**Abon-kotizo por 2010 : 8 Eŭroj**, kaj sendu ĝin al la kasisto :

Pierre Lemarchand, 2 Résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine. (Tel. 02.35.34.28.78).

## Financa raporto je la 7a de oktobro 2009

| ENSPEZOJ (Eŭroj) | | ELSPEZOJ (Eŭroj) | |
|---|---|---|---|
| Ĉe CCP la 01/01/2009 | 2 939,91 € | | |
| Kotizoj : | 374,00 | Bulteno :<br>Etikedoj por kovertoj : 22,30<br>Sendado :<br>leterkovertoj<br>+ poŝtmarkoj : 204,90 | 227,20 |
| | | Poŝtbanka Administracio | 9,00 |
| | | « Poŝamiko » por lokaj respondeculoj | 30,00 |
| Sumaj ENSPEZOJ : | 374,00 | Sumaj ELSPEZOJ : | 266,20 |
| | | Ĉe CCP la 7a oktobro de 2009 | 3 047,71 € |
| Bilanco | 3 313,91 | Bilanco | 3 313,91 |

Jen la stato de nia asocia kaso, prezentita dum nia Ĝenerala Kunveno en Hérouville St Clair la 11an de Oktobro 2009. La kontoj estis kontrolitaj de nia amiko Pierre JOUVIN.




**Poŝtmarko :**

***1995 HUNGARIO :***
***47a Internacia Fervojista E°Kongreso en Pecs.***

Se vi konas Internet-adreson de geesperantistoj kiuj ŝatus ricevi nian modestan bultenon, vi bonvolu ĝin sendi al ni, au instigu ilin sendi al ni la informon. Se via Internet-adreso ŝanĝus, ne forgesu sendi al ni la novan. Antaŭdankon.